

## Vydávání časopisu La Progreso v letech 1928-1929

V roce 1928 bylo vydávání časopisu zřejmě na rok zastaveno. Ročník XI. končí v říjnu 1928 (po stranu 76) a pokračuje teprve v listopadu 1929 (od strany 77), stále jako ročník XI. Na titulním listě je uvedeno

### XI. jarkolekto 1928-1929

a také v seznamu (Tabelo de enhavo) články odpovídají uvedeným stranám, např. *Montara balado* na str. 67 (1928) a *Problemo de rasoj* na str. 80 (1929).

# LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO  
DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO  
ESPERANTISTA

XI. JARKOLEKTO

1928—1929



RESPONDA REDAKTORO: RUD. HROMADA  
REDAKTOROJ: H. K. BOUŠKA (PRAHA), O. GINZ (PRAHA),  
DR. STAN KAMARYT (BRATISLAVA)  
REDAKCIO & ADMINISTRACIO:  
PRAHA VII.  
SOCHAŘSKÁ 333

---

PRESIS JAN MINÁŘ NYMBURK

# T A B E L O D E E N H A V O

## LITERATURO

Signo \* montras poemon.

### Originala:

*Hohlov N.: Al Jaime Grau Casas . . . . .	14
Ribault O. D.: Originalaj proverboj . . . . .	4
„ : Vivajoj — niaj fratoj . . . . .	17

### Tradukita:

Čapek Karel: Fabrikejo de Absoluto, ĉap. II. & III. (Trad. R. Hromada)	14, 35
*Čech Sv.: Kantoj de Sklavo, VII. (Trad. J. Ježek)	16
Jeřábek V. K.: La kruĉeto. (Trad. Božena Vlčková)	78
Langer Fr.: Ruzeĝa trompisto. (Trad. Dr. Stan. Kamaryt)	54, 67
Machar J. S.: La ĉeĥa libro (Trad. Rud. Hromada)	71
*Machar J. S.: Profetaĵo (Trad. Miloš Lukáš)	54
Majerová M.: Reĝino de beleco (Trad. Rud. Fridrich)	57
*Neruda Jan: Montara balado (Trad. Miloš Lukáš)	67
Wolker Jiří: Maljunulo (Trad. Rud. Fridrich)	2
<b>El estona:</b> *Under Marie: Dum florado de siringoj (Tr. Hilda Dresen)	78
<b>El greka:</b> Pensoj de Marko Aurelo (Tr. P. E. Stojan)	66
<b>El ukraina:</b> Pranicka Marja: Miniaturoj (Tr. P. Stojan)	4

### Pri literaturo kaj libroj:

Lingvaj respondoj de Dro Zamenhof 9, 28 — Tradukoj el la ĉeĥa literaturo 11 — Uĉebnice a slovníky 19 — Citajoj el biblio 19 — Rekomendindaj libroj 21 — Tago de la originala literaturo esp. (N. Hohlov) 23 — Znáte esperantské romány? 23 — Literatura konkurso en Antwerpen 24 — Libroj de Mosse — Libroj de Ferdinand Hirt u. Sohn 28 — Zamenhof-Radikaro de Wüster 40 — Pri landnomoj 41 — Komercaj esprimoj 59 — Nova ĉeĥa propaganda lernolibro-vortaro 73 — For la neŭtralismon! 73 — Zamenhof kaj Fundamenta Krestomatio 75 — Eĥoj de la konferenco Paco per Lernejo 76 — Rádce českého esperantisty 83 — Kantareto 83 — Velký slovník esper.-český 83 — Originala Verkaro de Zamenhof 83.

### POR KOMENCANTOJ

Henri Farman 5 — En teatro 6 — Por kursanoj 18 — Ni ridu kune 85 — Spritajoj 85.

### EL SCIENCO

Ginz Otto: La tombo de la antaŭhistoria homo . . . . .	6
Dr. Kamaryt Stan.: Behaviorismo . . . . .	7
Dr. Kamaryt Stan.: Temperamento . . . . .	38
Nicolai G. F.: Problemo de rasoj (Trad. Dr. St. Kamaryt)	80
Stojan Petro: Ĉu lingvistiko estas scienco? . . . . .	8

## EL ĈEĤOSLOVAKIO

Prezidento Masaryk al la infanoj (Tr. S. Dlouhá)	70
Prezidento Masaryk kaj Esperanto (V. Echtner)	70
La ĉeĥa libro (J. S. Machar-Rud. Hromada)	71
Banurbo Teplice-Sanov, kongresa urbo (B. Guttman)	33
Loĝeja manko en Praha 6 — La tabaka rikolto 6 — Informoj el ĈSR 18 (ĉio de O. G.) — Tri informoj 83 (R. H.).	

## ESPERANTISTA MOVADO

### Tutmonda:

20. Kongreso de Esperanto 24 — Kongresa karavano de Mosse 24 — Eĥoj de la konferenco Paco per Lernejo en Praha. 26. 76 — Novaj enketoj kaj eksperimentoj (IALA) 23 — Diversa 25.

### Ĉeĥoslovaka:

Pri Ĉ. A. E.: Ĉs. Asocio Esperantista en 1927 (R. H.)	43
Financoj de ĈAE en 1927 (Fr. Slavík)	47
IX. jarkunveno de ĈAE en 1928	11, 29, 47
Komitataĵoj de ĈAE en 1928	46
Raportoj el la komitataj kunvenoj de ĈAE	49, 50, 86
Niaj zorgoj (R. H.)	13
Sciencita Sekcio de ĈAE (Dr. Kamaryt)	49
Junulara Sekcio de ĈAE-Ni preparu la vojon (Jar. Novák)	52
Alvoko de ĈAE al ĉs. samideanoj (R. H.)	29
Rud. Fridrich: Propaganda materialo: Obtiĝe dorozumivání 12 — Odborníci nevyalézají praktických věcí ve svém oboru 12 — Nic na světě není dokonalé 32 — Míneňi filologa H. Schuchardta o umělem j. m. 87.	
O. Ginz: Ĉeĥaj notoj pri esp.	32, 87
Otto Skleněka: Mea culpa	77
Jul. Šupichová: Komenský a my	27
Jinde a u nás	53, 59
Deset let	65
Neučme jen, ale také poučujme	84
IV. Ĉeĥoslovaka Kongreso, Teplice-Sanov	11, 51, 52, 60
Nova oficiala priesperanta iniciato de la ĉs. ministerio	1
Ceský tisk o esperantu	26
Movado en ĈSR	32, 87
Ĉeĥaj fervojistoj 1 — Al kluboj (Katalunio-Dr. Parma) 21 — Esp. & Komerco 28 — Meritplena laboro de J. Wurmová 28 — Radioparolado en Praha 52 — Esp. prediĥko en Praha 52 — Silezia Ligo Esp. 52 — Esp. resumoj en revuo Slunce 76 — Tradukoj el La Progreso 76.	

## LINGVA MOVADO

H. K. Bouška: Jazykové výklady, str. 53—68	přiloha
— ou —: Lingvaj respondoj de Dro Zamenhof	9
P. Stojan: Ĉu lingvistiko estas scienco?	8
La viva bazo de nia lingvo	20
Iom da ordo	39
S. K.: Posedanto — Proprulo	22
— anto: „ „	21
S. K.: Působití, agi, efiki en kemia kaj fizika senco	22
S. K.: Komercaj esprimoj	59
R. H.: Dek Demandoj kaj Respondoj	II. 1, 41; III. 42, 74
R. H.: Teksty a jejich překlady s poznámkami	10, 42
R. H.: Konsiloj pri eraroj	22
La Efiko de Okhora Leĝo en Francujo	5
La klopodoj de Granda Britujo kaj Germanujo pri loĝeja krizo	18
De la redakcio	11, 76, 85
Diversa	25, 42
Korespondi deziras	27
Literární soutěž Progresu	28, 76

# LA PROGRESO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤOSLOVAKA ASOCIO ESPERANTISTA

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: PRAHA-VII. SOCHAŔSKÁ 333.

Jarabono (10 numeroj) Kĉ 20.—; fremdlando Kĉ 25.— (aŭ 4 sv. fr.) Escepto: Aŭstrio, Jugoslavio, Pollando kaj landoj de Stockholma interkonsento: 3 sv. fr. Konto de Poŝta Ĉekoficejo Praha: N-ro 34.271

## NOVA OFICIALA PRIESPERANTA INICIATO DE LA ĈEĤOSLOVAKA MINISTERIO

La oficiala Bulteno de la ministerio de instruado kaj nacia klerigo enhavas en la 1.n-ro de la X. jk. (pĝ. 21.) la jenan ministerian informon:

„Materialo pri esperantista movado en lernejoj.

Por la ekspozicio de la samtempa kulturo en Brno estas dezirinde kunmeti sinoptikon (přehled) de esperantista movado en lernejoj de la Ĉeĥoslovaka respubliko. Tial mi petas la administrejojn (direktejojn) de la lernejoj popolaj, direktejojn de la lernejoj mezgradaj kaj fakaj ĉiukategoriaj, ke ili respondu la jenajn demandojn:

1. Nomo kaj titolo de esperantisto en la lernejo,
2. Ĉu li havas ekzamenon pri esperanto kaj kiam li ĝin faris,
3. Ĉu li instruas esperanton en lernejo aŭ kurso,
4. Ĉu li korespondas kun eksterlando (kun kiu kaj pri kio),
5. Ĉu li posedas materialon por la ekspozicio de la samtempa kulturo,
6. Ĉu li estas literature aktiva en la sfero de esperanto.

La respondoj estu sendataj ĝis 15-a de februaro 1928 senpere al la landa lerneja konsilantaro en Brno.“

Ni tre esperas ke la samideanoj instruistoj kaj profesoroj, atentigis pri tiu ĉi ministeria informo siajn direktorojn, por ke tiuj ĉi nepre sendu la koncernajn respondojn laŭ la fiksita dato. Ili havas dankon de ni ĉiuj.

Dr. St. Kamaryt,  
Vicprezidanto de ĈAĖ.

Ĉiuj ĉs. lernejoj ricevis de siaj fakaj organizaĵoj detalan programon de la Ekspozicio de Samtempa Kulturo en Brno; la programo koncernas ĉion rekomendindan, kion la ĝeinstruistaro aŭ ĝelernantaro povus ekspozicii pri la novtempa epoko de sia instruado. Inter multaj proponoj estas tie ankaŭ punkto pri esperanto.

Števa Bálková (Žižkov).

Mi informas vin, koncerne la alvokon en la Bulteno de la ministerio de instruado, ke mi tuj aliĝis kun jesaj respondoj kaj anoncis, ke mi uzas esperanton en mia klaso por interlerneja praktika korespondado pere de la Ruĝa Kruco (kun Indio, Kalifornio kaj Japanujo). En Brno mi ekspozicios ĉion, kio koncernas tiun ĉi korespondadon.

Števa Bálková, instr.

Informu Asocion, ke vi ankaŭ aliĝis!

JIRI WOLKER:

**MALJUNULO**

(Dilo II. Prósy. Povidky.)

Li loĝis en la lasta dometo ekstere de vilaĝeto tute apud arbaro. La vilaĝeto estis lokita sur supro de monto, kiu krute leviĝis el nesupervidebla ebenejo; tial la maljunulo vidis el siaj fenestroj la vastan regionon. La homoj nomis lin „la maljuna Sova“, kaj ne plezuris rilatante kun li, ĉar li estis malgajemulo.

La domareto mem estis malgranda kaj trankvila. Vi dirus, ke ĝi kuŝas sub akvo. Dum tago nur kelkaj maljunulinoj kun dorskorboj plenaj de pinglobranĉaro tranaĝis kiel malĝojaj fiŝoj. Vespere ĉio senviviĝis; nur maljunaj hipokas-tanoj knaris per nigraj branĉoj.

Se io okazis en mondo, sciigoj pri tio alvenadis kiel fabelaj eĥoj. Ĉiu okazintaĵo kreskis per buŝa transdono al mirindaj dimensioj. La homoj kun plezuro rakontadis pri ili; tamen ili estis tiom saĝaj, ke ili al neniu el ili kredis.

Sova estis altstatura osteca homo kun senhara kranio kaj blanka barbo. Apogante sin al sia nodbastono li trenis sian korpon post si kiel pezeĝan veturilkorbon. Li vaĝadis ĉirkaŭ la domoj, sed plej ofte laŭlonge de la arbaro.

Alie li vivis tute sola. Se homoj ne deziris vidi lin, li des pli malmulte ilin. En la vilaĝeto li vivis tridek jarojn enmigrinte kiel viro jam neĵuna. Kial li faris tion, neniu sciis certe; nur maljunulinoj rakontaĉis al si, ke li rifuĝis ĉi tien el urbo pro iu malfeliĉo. Ĉiu klarigis alie la malfeliĉon.

Unuj diris virino, aliaj perdo de mono kaj kelkaj eĉ mallaŭte opiniis, ke krimulejo.

Sed dum jaroj lia diverskolora estinteco ĉesis vekti intereson kaj poste kaj poste li fariĝis ordinara alaĵo de la komunumo. Ĝuste kiel tri benketoj sur la vilaĝplaco aŭ la kruco malantaŭ la preĝejo.

Jiri Wolker (\* 1900, † 1924), talentita verkisto, skribis kelkajn poemojn, kiuj restos verkoj de ĉeĥa literaturo, en prozo skizojn kaj fabelojn kaj tri unuaktajn teatraĵojn. Komencinte kiel propagandisto de proleŝaria arto li fariĝis plej granda etika poeto de nova ĉeĥa literaturo pentrante mondon humanecan unuigitan per varmega ligilo de simpatio kaj solidareco. (R. F.)

Plej multe li plezuris sidante apud la fenestro de sia ĉambro. Antaŭ la fenestro estis ĝardeneto, post ĝi herboza ebenejo, kiu transiris en kruta deklivo. Tial li povis bone supervidi la tutan horizonton kun sennombraj vilaĝoj, preĝejoj, ŝoseoj kaj kampoj. En profundo inter montoj kaŝitaj en fumo aperadis urbo, kiu vespere ekbrilis en miloj da lumoj. En vintro, kiam la noktoj estis eksterordinare malhelaj, ĝi ŝetadis la lumegon de elektraĵ lampoj ĝis en liajn fenestrojn kaj penetradis tra ili kiel senbrila duonlumo al vermoborita meblaro.

Tiam Sova rigardis la regionon kaj liaj okuloj, kiuj estis strange malmulte tuŝitaj de maljuneco, ekhavis brilecon nekutime ribeleman. Li similis maljunan ĉashundon, kiu aŭdas la vokadon de kondukistoj kaj la akran sonadon de ĉasistaj kornetoj, sed ne povas movi sin de loko. Li sidis sur malalta seĝo aŭ iradis en mallumo kun intertransmetitaj manoj ĉirkaŭ la tablo, apogante sin al ĝia tabulo.

En mallumo antaŭ li tondris stacidomoj, briletis kafejoj, malliberejoj, preĝejoj kaj bordeloj. Krom li al neniu en vilaĝeto aliradis iliaj voĉoj. Nur en lian ĉambron penetradis la maldelikatega voĉo de ebenejoj, kie homoj luktis pri vivo. Centmiloj da intereso renkontis sin kaj interbataladis kaj ĉi tie — malproksime de ĉio — kreskis ekkono, ke celo de homa vivo ne estas venko, sed batalo. La maljunulo aŭskultadis — aŭskultadis — por ke ne elglitu al li eĉ la spirado de lokomotivoj, kiuj ie en malproksimeco brule lumis en nokto.

Li estis treeĝe maljuna. Li mem ne plu sciis, kiom da jaroj li aĝas. Tuta korpo ĉesis servi al li krom okuloj kaj ankoraŭ unu obstina senco: v i v i. Kiam li sidis kaj rigardis dum longaj vesperoj la disŝetitajn fajrejon de lumoj sub si, terura sopiro lin skuadis. Li volis ekkapti denove kaj ree tiun mondon, li aŭdis ĝian vokadon, per kiu ĝi lin allogadis: Venu! Venu! Li imagis urbon simila al pana pasto, kiun li povus knedi al formoj neviditaj. En lia kapo turniĝadis miloj da intencoj, kiujn li estis forĝinta en sia izoleco.

Li sentis forton de armeestro, kiu atakprenus tutan mondon en unu sola

batalo por fondi la plej justan regnon. Li elpensis financajn projektojn, per kiuj li perfortus la mondon ĝis absoluta sklaveco. En lia koro flamadis pasio, per kiu li kafenus ĉiujn virinojn en haremon kvazaŭ por frenezuloj. Li sciis, per kio li ekflamigus la popolamasojn, kiujn li kondukus tra revoluciaj stratoj.

Sed poste li rigardis siajn brakojn kaj vidis, ke ili estas velkiĝintaj kaj sensangaj, li rigardis siajn kruojn kaj ekstremis pro ilia senpovo, li provis sian forton kaj ekkonis, ke ĝi sufiĉos ĝuste por porti sur si la putriĝintajn branĉojn de liaj brakoj kaj kruoj.

La vivo, en kiun homo enŝprucas sian forton, aperadis al li kiel sonĝo. Ĝi estis terura sonĝo kaj li devis batali kun ĝi eĉ morton riskante. Li sciis, ke estas necese mortigi la sonĝojn kaj li sciis ankaŭ, ke oni mortigas ilin nur tiel, se oni ilin korpigas.

Sed li estis maljunulo. Se lia volo estis eterne fera, kaj se ĝi sentis la altiradon de magnetaj horizontoj, lia korpo estis ĉifono, kiu flirtis laŭlonge de putriĝintaj ostoj. Li estis devigita rekoni, ke la ebenejo estas pli forta ol li. Ke li ne atingus la urbon, ke li falus jam apud la vilaĝeto, tuj kiam la ebenejo estus preninta lin ĉe brako per siaj kampoj, arbaroj kaj urboj.

Sed li tamen ne allasadis tiun konkludon. Li timis ĝin same, kiel li tiam estis ektiminta la urbon, kiam li ekkonis en ĝi, ke li ne plu estas viro, sed maljunulo, kiun la stratoj venkus. Do li forkuris el ĝi plej rapide kiel li povis. Li envolvis sin en silenton de forlasita vilaĝeto, ne ne sciante li mem, ĉu li forkuris antaŭ la urbo, antaŭ la timo aŭ antaŭ la batalo.

Foje li estis juna. Li havis kvin filojn, kiuj pereis ĉiuj. Unu kiel inĝeniero en minejo, la alia kiel esploristo en Saharo, la tria kiel soldato en milito, la kvara pro sifiliso, la kvina konstruis al si fabrikon kaj estis mortigita de laboristoj dum striko. La lasta havis filon, kiu post morto de la patro fariĝis portisto en haveno en Hamburg. Ĉi tiu estis la sola vivanta ligilo de la avo kaj de la mondo. La nepo sendadis al li ĉiunmonate monon kaj je la Novjaro leteron.

La maljunulo rapide tralegis liajn leterojn kaj formetis ilin. Li ne kun plezuro vidis ilin; ili vekis en li envion. Li ekvidis havenojn kun ŝipoj, negroj, Angloj kaj kolosajn kestojn plenajn de citronoj, teksaĵoj, kotono kaj kafo. Li ekvidis maron katenitan de arĝentaj ĉenoj, kiujn engravuris en ondojn la transoceanaj vaporŝipoj. Fine li ekvidis sin mem en dronigita ĉambro kun pendolhorloĝo, kiu regule klaketis per dentoj, kvazaŭ ĝi frostus.

Strangolite de senkompata realeco li falis al tero kaj kriis malespere al kvar muroj:

„Helpu! Mi volas vivi! Mi volas vivi!“

Neniu alvenis, neniu aŭdis lin. Li mem devis forviŝi malvarman ŝviton de frunto, li mem devis trankviligi sin.

Li elkuradis el dometo kaj lamiris tra la arbaro. Ĉu en vintro, ĉu en somero, vilaĝanoj renkontadis lin en la sama vestaĵo, en botoj kaj kun nodbastono, similan laŭ aspekto al vojaĝisto, kiu intencas penetri tra plej sovaĝa regiono, kaj laŭ marŝado al kriplulo.

Dume la ebenejo fajreris pro multego da lumoj, vilaĝetoj dormis apud la ŝoseo kiel gravedaj virinoj kaj urboj eksplodis en revolucioj kiel ekbruligitaj pulvomagazenoj.

Tiam okazis, ke neatendite leterportisto ekfrapetis al pordo de barako de Sova. Estis nek proksime de la unua de la monato, nek proksime de la Novjaro. La maljunulo mirigite skuis la kapon irante tra la koridoro por malfermi pordon.

La leterportisto transdonis al li telegramon.

La maljunulo longe transmetadis ĝin el unu mano en alian. La blanka paperego kreskis kaj plenigis baldaŭ la tutan ĉambron. Al Sova tremetis la manoj kaj al li ŝajnis, ke la telegramo estas de momento al momento pli peza.

Li malfermis ĝin kun streĉo de ĉiuj fortoj kaj legis:

„Via nepo Francisko Sova estis mortpafita pro partopreno en ribelo de laboristoj.

Polica direkcio en Hamburg.“

La maljunulo finlegis kaj ekpensis.

„Li estis dudekdujara“, li diris al

si, „— kaj li mortis. Ĉe ribelo de laboristoj.“

Li ekrigardis el fenestro.

Li vidis sub si ebenejon de mondo kiel moviĝantan maron. Li aŭdis voĉojn de soldataj trumpetoj, de marteloj, de sonoriloj. Li ekvidis fabrikojn kun elstarantaj fumtubegoj, laboristojn, en kazematoj, policanojn en la stratoj kaj malheroojn en palacoj. Li ekvidis miliojn da kompatinduloj, kiuj murdadis mizeron, li ekvidis milionojn da tiuj, kiuj ĝin defendadis; aŭ tial ĉar ili dikigis el ĝi, aŭ ĉar ili pro sia mola koro volonte algluadis al ĝi paperan nimbon. Kaj precipe pro tio, ke ne estus venko, se ne estus batalo, kaj ne estus batalo, se ne estus malamikoj.

Li ekaŭdis voĉon de l'mondo vokantan pri helpo el malvirtoj. Li ekvidis, kie li devas ekstarti. Li komprenis la minacordonon de la tero, kiu kriis:

„Tiel vi ekposedu min, viroj!“

Liaj okuloj ekbrilis.

Maljunule li sopiris iam ekposedi mondon laŭ mil manieroj. Hodiaŭ li ekkonis, ke oni povas fari tion laŭ unu sola maniero: tiel, kiel la mondo deziras.

Li aŭdis voĉon, kiu vokis: „Armu vin!“ Li aŭdis koron tamburantan al marŝo.

Li sciis, ke al batalo estas necesaj homoj junaj kaj fortaj. Sed liaj muskoloj estis egale kadukaj, liaj kruroj fleksigis kaj la manoj tremis.

Tial li scipovis trovi la ĝustan vorton.

Li diris:

„Mi mortu!“

Li diris tion kiel soldato, kiu petas de sia komandanto novan armilon — forĵetante sian korpon en angulon de la ĉambro kiel rompitan lancon.

Tradukis R. Fridrich,  
Brno - Královo Pole.

## ORIGINALAJ PROVERBOJ

de O. D. Ribaulb.

Agaca ŝajnas vinbero sur la najbara tero.

Brava kaporalo ne tremas en batalo.

Ciferoj sen nulo — vana kalkulo.

Ĉarlatana parolo pli efikas ol lia pilolo.

Dronis ŝipeto en maro, ne trovos ĝin tuta ŝiparo.

El mi la mielo: zumas la abelo.

Fiŝo serĉas akv-profundon, homo kuras ter-abundon.

Guto en maro — homo en homaro.

Ĝis aŭtuno kreskas bero, ĝis la maro la rivero.

Haroj frizaj — manieroj markizaj.

Hieraŭ generalo digna — morgaŭ en ĉerko ligna.

Kiu ne spertis malriĉon, tiu ne konas feliĉon.

Lago estas ĝemo, maro la diademo.

Liceo moderna, turmento lerna.

Modesta rezedo aromas super bedo.

Muzikisto hobojas, hundo bojas.

Ne makulu novan veston, ne forperdu junhoneston.

Nenia lanterno lumas por eterno.

Neeĝalaj vivas homoj en homaro: unu restas sklavo, kaj alia caro.

Oni vivas apenaŭ spiras, sed morti ne deziras.

Pli plaĉas fia sorto ol la bela morto. Por belulino la rozo, por mizerulo — almozo.

Printempo — unua jartempo.

Putriĝas dormanta lago, malvirtiĝas viro sen ago.

Rozo odoras, rozpiko doloras.

Sengusta ŝajnas buljono pagita per ŝtelmono.

Vegetarano ne revas pri rostita fazano.

MARJA PRANICKA:

## MINIATUROJ

Dio kreis la Homon el materialo prenita de la Bestoj. La Bestoj estas vere originalaj estaĵoj: Aglo la fiero, Najtingalo la dia kantisto, Leono la brava, Hieno la malnobla, Urso la naiva, Vulpo la ruza, Elefanto la grandanima, Hundo la fidela, Leporo la timema; ĉiuj Bestoj havas siajn proprajn kvalitojn, nur la Homo ne havas ilin, ĉar li ne estas memstara ulo. Eĉ la Simio estas originala, kun siaj ridindaj manieroj. La Homo kiu sin nomas „la reĝo de la tero“ estas la plej mizera degenerulo kies virtoj spegulas la bestajn virtojn kaj kies malvirtoj imitas la bestajn malvirtojn. Tial la „reĝino de la tero“ ornamas kaj plibeligas sin per plumoj



de Birdoj, per feloj de Bestoj, per mal-sanaĵoj de Konkoj. — Ci venis lasta, la Homo, kaj ci foriros la unua — el tiu tero kiun ci malpurigis per la kulturaj krimoj. —

\*

Dum dek jarcentoj kreskis la Pino, bona giganto de la arbaro, dum dek minutoj la Pinon dehakis la Homo, malbona nano, kiu ĝin vendis al aliaj nanoj por dispecigi, kaĉigi, fabriki el la pin-kadavro la ĵurnal-paperon, sur kiu alispecaj nanoj skribis milojn da mensogaj kaj falsaj sciigoj. Per tiuj sciigoj ili venenis la cerbojn de la legantaj Homoj.

\*

Dum longaj miljaroj pace vivis la Monto kun siaj kreskaĵoj, bestoj, torrentoj, grotoj kaj veluraj muskotapiŝoj. Foje venis la nanoj, kiuj tranĉis vundojn en la monto-dorso, forbruligis belajn arbojn, fortimigis mildajn animaĵojn, kaj fine starigis la Hotelon por tiuj nanoj, kiuj ne estis kontentaj en la valoj plenigi siajn ventrojn je la kadavraĵoj kaj drinkaĵoj, kiuj volis sur la pinto de la monto manĝaĉi kaj drinkaĉi, kaj kraĉi sur la tutan mondon.

\*

Kaptis la nanoj — per siaj iloj — la plej diversajn bestojn kaj birdojn, metis ilin en malvastajn kaĝojn, ĉirkaŭis la kaĝaron per la barilo kaj muroj, kaj nomis tion la „zoologia ĝardeno“. Kaj la inteligentaj naninoj kondukis en tiun malliberejon siajn idojn por amuzi ilin je tiu vidaĵo. Kaj la putra fiodoro de la malliberejo plaĉis al la putra animo de l' nanoj.

\*

Aĉetis nano ŝafidon, kaj portis ĝin hejmen: ĝojis la nanidoj, kaj karesis la molan feleton de la ŝafido, kisis la mildan buŝeton kaj ludis kun la saltema estaĵo. Venis lasta vespero antaŭ la festo „Reviviĝo“, la nanino buĉis la ŝafidon, rostis ĝian kadavron, kaj morgaŭ — en la tago de la Dia Reviviĝo — la ĝenanoj plezure formanĝis la kadavraĵon de la ŝafido. Kaj la najbaroj laŭdis tiun familion de la nanoj kiu „dece“ festis la sanktan feston.

\*

Naskiĝis la saĝaj nanoj, kiuj elpensis mirindajn maŝinojn kaj instru-

mentojn por tre rapide mortigi la aliajn nanojn, por facile detruu la belajn arbarojn, por oportune buĉi la bestojn, por fabriki la drinkaĵojn, tabakon, morfion, haŝiŝon, por produkti senmoralajn luksaĵojn, por presigi la mensogajn librojn, kaj la tuta nanaro ilin laŭdis, ĉar ili kreis la Kulturon.

\*

Ci venis lasta, la Homo, kaj ci foriros la unua — el tiu tero kiun ci malpurigis per la kulturaj krimoj.

Trad. P. Stojan.

\*

Henri Farman, franca aviadisto diris al Emile Houbart, direktoro de la Movado, organo de francaj esperantistoj: „Vi ne imagas la egajn malfacilaĵojn pri la redaktado de la legitimaj paperoj por la doĝano, difinoj pri la pakajoj, adreso, pezo, ktp., en lingvoj franca, angla, germana, holanda, rusa ktp. Tio atakas la cerbon ĝis frenezeco. Kaj kiam la pilotoj alteriĝas en unu lando, kaj kelkajn horojn poste en dua, en tria lando... kiaj malfacilaĵoj por la interkompreno kun la enlandanoj pri la diversaj servoj. Kia grava perdo de tempo! Tamen sufiĉus eble unu aŭ du centoj da mallongaj frazoj en Esperanto pri la servoj koncerne la aparatojn, la ties provizoj, riparoj ktp., kiujn scius en kelkaj horoj ĉiuj, kiuj en la mondo sin okupas pri aviado, de la pilotoj, de la manovroĉefoj ĝis la ŝveliganto de pneŭmatikoj. La diversaj paperoj estu redaktataj en la lingvo de la lando kaj en Esperanto, kiel jam faris la moderna Pariza Cambro de Komerco por kelkaj el siaj legitimaj paperoj. Cu en aviado tia simpla afero estas super la homaj fortoj? Kiom da tempo daŭros tia situacio?“

\*

#### La efiko de la Okhora Leĝo sur produktado en Francujo.

Informservo de Internacia Laboroficejo.

La ĉiusemajna eldonaĵo de la Internacia Laboroficejo, Industrial and Labour Information (Informations sociales), resumas raportojn de la Franca Ministerio de Laboro pri la efiko de la Okhora Leĝo sur produktado.

Ci tiuj raportoj rilatas al granda nombro da industrioj, inter aliaj, ŝpinado kaj teksado de kotono, fabrikado de kaŭĉuko kaj vakstolo, fandejoj, fabrikado de metalfadeno kaj najloj, de papero, kartono kaj porcelano, seĝejoj, brikejoj kaj tegolejoj, ktp.

En ĉiuj okazoj la esploro montris ke, post kelkatempa malpliigo tuj sekvinta la enkondukon de la okhora labortago, produktado rapide reatingis la plifruan nivelon, dum en iuj industrioj, la Okhora Leĝo stimulis klopodojn por reorganizo rezultiginta pli grandan produktadon ol sub la dekhora sistemo. Tiu rezultado ĝenerale devenis de la enkonduko de pli mo-

derna maŝinaro, plibonigo de ekzistanta ilaro kaj pli efika utiligo de la teknikaj kapabloj de la laboristoj.

La aluditaj raportoj estas bazitaj sur sciigoj kolektitaj de laborinspektoroj eventuale kompletigitaj kaj korektitaj de la koncernataj firmoj, kiuj aprobis la eldonon de la raportoj.

**Loĝeja manko en Praha.** Kvankam multego da novaj domoj estis en Praha dum la lastaj jaroj, grandparte kun ŝtata subteno, konstruitaj kaj kelkaj tute novaj kvartaloj ekstis, daŭras tie la loĝeja krizo. Ĝin forigi volas usonaj entreprenistoj, kiuj prezentis jam proponojn por starigo de 4000 grandaj domoj en mallonga tempo. La kondiĉojn, kiuj ŝajnas esti favoraj, studas la urba konsilantaro.

**La tabaka rikolto en Ĉeĥoslovakio** liveros dum nuna jaro laŭtakse 7500 tunojn. En jaro 1926 estis sole 6500 tunoj. La nombro de ŝtate permesitaj tabakkulturistoj en diversaj partoj de la ŝtato — ĉefe en Slovakio kaj Subkarpata Rusio — estas proksimume 6350. La valoro de la pasintjara rikolto estis 37,600.000 Kč. Ĝin tutan aĉetis la ŝtataj tabakaj entreprenoj, kiuj prilaboras tabakon en 19 ŝtataj fabrikoj.

**El fervojista vivo.** Fervoja konduktoro, pensiita post 33-jara servado kalkulis laŭ siaj notoj, kiom da kilometroj li traveturis dum la tuta tempo. En komenco li traveturis jare 70—80 milojn, poste 90 milojn da kilometroj. La maksimumo kiun li traveturis en unu jaro estis 96 miloj da km. Post la enkonduko de la 8-hora labortago, la cifero malaltiĝis al 60—65 mil km. Entute li traveturis 2,550.299 km, kio sufiĉas por preskaŭ 64foje ĉirkaŭveturi la tutan terglobon. (J. Gunia en Fervojisto.)

**En teatro.** — Mi petas vin, sinjorino, demeti vian ĉapelon. Mi pagis por la loko kvin spesmilojn, kaj volas vidi la teatraĵon. — Sed mi pagis por la ĉapelo kvindek spesmilojn kaj mi volas, ke oni ĝin ankaŭ bone vidu.

O. GINZ:

#### LA TOMBO DE LA ANTAŬHISTORIA HOMO.

Laŭ dro J. L. Piĉ kaj aliaj fontoj.

Post la diluvia epoko la klimato de norda Eŭropo konsiderinde ŝanĝiĝis; sur potencaj tavoloj de la diluviaj argiloj aperas jam la samaj kreskaĵoj, kiaj kreskas hodiaŭ, ni trovas tie restaĵon de bestaj specoj, kiuj grandparte ĝisvivis la nunan tempon kaj ni rekonas tie ankaŭ postesiginojn de nova tribo.

Inter la renaskiĝinta naturo aperas nova gento, kiu en multaj rilatoj diferencas de la popolo diluvia. Ĝi fondas por si konstantajn loĝolokojn kaj okupas sin ne plu sole per ĉaso, sed ĝi havigas la vivrimedojn ankaŭ per bredo

de brutaro kaj per terkulturado. La zorgemo, kun kiu la homo aranĝis tombojn por siaj mortintoj pravas, ke li kredis pri nova vivo post la morto.

Ĉi tiu kredo estas tiel antikva kiel la kredo pri ia supernatura forto. La primitiva homo vidis la diecon en la nekompreneblaj naturaj fenomenoj alportantaj bonon aŭ igantaj teruron. Laŭ la grado de sia intelegenteco li prezentis al si la dion naturaliste aŭ abstrakte. Tiamaniere la unua homo ekhavis la ideon, ke krom ĉio, kion li vidas ĉirkaŭ si, ekzistas ankoraŭ io alia, nevidebla kaj napalpebla. Li komencis tiel ankaŭ kredi, ke per morto ne finiĝas la homa ekzisto, sed ke daŭras ankaŭ poste la vivo. Pri la vivo post la morto la homo preferis imagi, ke ĝi estas malpli pena kaj pli bela ol la tiama malfacilega vivo surtera. Li volis al si tiamaniere igi pli tolerebla la ĉiutagan klopodon.

Por ke la mortinto konvene eniru tiun pli bonan vivon, estis necese, ke restu konservita nia movado. Ĉi okazis en granda halo de la iurilate la eksterajo de la homa formo kaj ke la foririnto estu dece ekipita. El tio devenis la ceremonia enterigo de la homo, kies kunuloj zorgis, ke lia transiro en la postmortan vivon estu laŭeble plej solena.

La praantikvaj tomboj estas do por la arkeologoj ne sole la esprimo de ia religia ceremonio, sed la nuna generacio povas laŭ ili juĝi, kiel la homo sin prezentis ĉe festaj okazoj. Lian ĉiutagan farton oni povas sekvi laŭ la malkovritaj sidejoj. Kvankam la longega tempo forpasinta rabis multon de ĉi tiu solena ekipoj, restis tamen en la tomboj sufiĉe da memoraĵoj, kiuj al ni fidele vidigas la vivon de generacioj longe antaŭ ni formortintaj.

La unua maniero, laŭ kiu la plej antikva epoko enterigis la mortinton, estis, ke oni metis la korpon kaŭre kuŝantan sur ĝian dekstran flankon, kapon al sudo, la krurojn al nordo. Lia vizaĝo estis do turnita al oriento, al la regiono, de kie venas la suno alportanta lumon kaj varmon kaj tiel ankaŭ la vivon. La brakojn havas la mortinto kutime fleksitajn sub la tempioj. La spino estas iam forte kurbita kaj la kruroj tre kuntiriĝintaj. Ĝi estas bildo de homo dormanta, kiu atendas, ke la suno ĉion viviganta vekos lin al pli bona vivo. Iam oni preparis la homon por la reviviĝo sidantan, infanojn oni trovis ankaŭ enterigitajn en poto.

Tomboj kun kaŭrantaj skeletoj aperas unuope aŭ are. Tiaj tombaroj estis fonditaj en regulaj vicoj de oriento al okcidento kaj certe estas, ke ili estis rimarkeblaj ankaŭ ekstere,

ĉar ili neniam interkruciĝas. Tomboj de personoj eminentaj estis enfositaj profunde, sub kaj ĉirkaŭ la tombo estis metitaj ŝtonaj platoj. Kovritaj ili estis ankaŭ per ŝtonaj tabuloj. En eksterordinaraj okazoj oni ŝutis sur la tombon konusforme kampan ŝtonaron kaj malhelan argilon, alportitan ofte el malproksima loko. Evidentiĝas, ke tiel okazis ne pro manko de taŭgaj ŝtontabuloj, sed pro iaj ritaj kutimoj, ĉar ofte ankaŭ tiuj ŝtonaj tumuloj estis supre kovritaj per tiaj tabuloj.

De la ceremonia vesto restis ĝis niaj tagoj sole malmulto, kio kontraŭstaris la influon de la tempo, sed laŭ speco kaj formo de la restintaj objektoj oni povas juĝi, kiu kaj kia estis la malaperinta parto de vestaĵo.

Ofte oni trovas en la tomboj pinglojn kaj aĝrafojn, ĉar ili estis uzataj por la arango de la vesto. Oni trovas ilin apud diversaj korpopartoj kaj laŭ direkto, kiel ili kuŝis, oni povas bone diri la manieron de ilia uzo. La valoraj trovoj de malgrandaj pecoj de leda supervesto konfirmis la hipotezon. Kapornamo estis orelingoj spiralaĵaj aŭ rondaj en diversaj formoj, faritaj el bronzo aŭ oro. Laŭ la pingloj trovitaj en tombo de riĉa virino ĉe la supro de la kapo oni imagas, ke la virino fiksitis supre siajn plektitajn harojn, sed plejparto de la trovataj pingloj kuŝantaj en proksimo de orelingoj servis por kunfikso de la vestaĵo sur la ŝultro. Satata estis kolĉeno iam plej simpla, konsistanta el argilaj globetoj, el traboritaj bestaj dentoj, iam el arte farita vico de bronzaĵaj, glatigitaj ostaj kaj sukcecaj disketoj kaj globetoj. Vesto estis sur la brusto iam plaĉe ornamita per similaj objektoj. Braceletoj estadis el samaj ornamaĵoj, sed plejparto da ili estis fabrikitaj el fandita bronzo aŭ oro. Ofte longa spiralo tia aŭ kelke da ili beligis la brakojn.

Grava ornamo de viro estis certe armiloj, sed ili tamen ne ofte estas trovataj en la tombo. Ilia pretiĝo estis tiel malfacilega kaj ilia poŭedo tiel necesa, ke oni malgraŭ la granda estimo al la mortintoj tamen preferis lasi la bezonatajn armilojn al la vivantoj. Ĉar oni valorajn armilojn, bronzaĵajn glavojn, sagojn kaj lancojn trovas en lokoj ekster la kutima sidejo de la tiama homo, ekzistas ankaŭ hipotezo, ke singardemaj homoj kaŝis zorge siajn armilojn por certe havi ilin en sia postmorta vivo al sia dispono. Grava aldono al tomboj estis diversformaj vazoj en specialaj formoj destinitaj por la mortintoj. En ilin oni metis versimile manĝon.

Apud la mortinto zorge enteriĝita oni iam trovis skeleton alian, sen ornamaĵoj aŭ sole ĝian

kapon. Oni opinias, ke tiel estis enteriĝitaj sklavoj por akompano de sia estro. Por montri, ke ili ne indas la saman enteriĝon, la dua skeleto estis iam turnita al okcidento.

Restoj de karbo kaj de ostoj montras al ni, ke ĉe la enteriĝoj okazadis, grandaj festaj manĝoj.

La tomboj liveras al ni multege da valora materialo por studo pri la vivo de niaj antaŭuloj. Moderna arkeologio legas el la negranda resto pri epokoj, kiuj estis dum multaj jarcentoj por la homaro misteraj.

Dr. STAN. KAMARYT:

### BEHAVIORISMO.

Tiu ĉi vorto enpenetros baldaŭ en nian fakan terminaron, ĉar ĝi estas nomo de nova psikologia skolo, kiu daŭre disvastiĝas kaj ricevas kreskantan influon en psikologiaj rondoj, precipe ĉe la psikologio uzita ekzemple en psikotekniko kaj pedagogio.

La nomo estas derivita de la angla vorto behaviour — konduto, kaj signifas precipe psikologian metodon. Laŭ ĝi la sola poveblo studi science la psikologiajn fenomenojn estas observadi, kiamaniere kondukas la homo kaj la ceteraj vivaj estaĵoj en ia situacio. La situacioj kaj la kondutoj de homo en ili estas la solaj faktoj, kiuj estas alireblaj por nia observo kaj sekve por scienca esploro. Tial la introspekto, la interna observo de si mem, en kiu la klasika psikologio vidis la tre gravan kaj efikan esploran metodon, estas por behaviorismo metodo neniel uzebla; ĝi ja ne donas faktojn science konstateblajn kaj kontroleblajn. Sed pri la konduto la behavioristoj kredas, ke la konduto dum la donita situacio estas laŭ sia rezultato la sama, estu la elparolita konvinko de la kondutanto kia ajn aŭ eĉ nula.

Laŭ ekzemplo citita de Bertrand Russel ĉiu, sur kiu ekpluvis dum lia promenado, malfermos la pluvombrellon, se li ĝin kunportas; iu el ili diros al si „ekpluvis“, la alia agos sen iel dirita penso, sed tio neniel influis la rezultaton de la agado. La kondutoj de homoj „havinta konvinkon“ kaj „nehavinta konvinkon“ estas la samaj. Dum varma vetero iras la homoj, same kiel

la bestoj, en malvarmetan flankon; la konduton neniel diferencigas, ke la homoj havas „konvinkon“ pri la pliagrableco de la ombro, kaj ke al la bestoj mankas tia „konvinko“. La rezultato estas la sama. Nenion plu ni povas efektive observi ol tiajn reakciojn al donitaj situacioj. La homa konduto diferencas de la besta sole per tio, ke la homaj kondutoj estas multe kaj multe pli diversaj, ke ili diferencigas ĉe ĉia ajn ŝanĝeto de la situacio, estu ĝi eĉ plej malgranda. La pensado konsistas sole en uzado de vortoj, la vortoj elvokas kondiĉajn respondojn. Per tio la demando, ĉu la bestoj ankaŭ „pensas“ reduktiĝas al demando, ĉu la bestoj montras en certaj situacioj certajn signojn, kiuj elvokas ŝanĝojn ĉiam laŭ la sama direkto. Tiaj ŝanĝoj estas konstateblaj kaj mezureblaj. Do la diferenco inter la homa kaj besta konduto estas sole laŭkvanta, sed tiu kvanto estas grandega. Oni atentu, ke ĉe tia vidmaniero oni nenie en tiu ĉi psikologio renkontas ideon aŭ imagon de animo. Estas intence. Ĉar la tasko de la scienca psikologio povas konsisti ekskluzive en tio: ekkoni la ordigon de reakcioj al situacioj kaj veni tiamaniere al leĝoj pri ilia reciproka aparteno.

Tiuj ĉi behaviorismaj ideoj multon helpis al disvolvo de la objektiva psikologio. Precipe la mezuranta pedagogio bazas sur behaviorismo kvazaŭ firma fundamento. Ĝia patro estu nomata J. B. Watson, kies „Psikologio el vidpunkto de behavioristo“ aperis en 1920.

## ĈU LINGVISTIKO ESTAS SCIENCO?

Ĉi-demando ne estas paradoksaĵo, sed serioza temajo diskutita de tre eminentaj sciencistoj. Nur, ni uzas ĉitie vorton „scienco“ en speciala senco de la „racia aŭ observa aŭ eksperimenta konfako studanta realaĵon laŭ rigora metodo“. En tiu senco francoj distingas „Faculté des Sciences“ kaj „Faculté des Lettres“. En la sama senco oni diras „scienca metodo“, „science pruvu“, ktp. En nespeciala senco la vorto „scienco“ estas uzata tre larĝe; oni parolas ne nur pri „scienco de langaĵo“ (lingvistiko) aŭ pri „historia scienco“, ankaŭ

pri „scienco de heraldaĵoj“ (blazono), „okultaj sciencoj“ (magio, teosofio, spiritismo), „sciencoj sociaj“. Akceptante tiun larĝan komprenon ni ne povas rifuzi la nomon de scienco al la arkeologio, numismatiko, paleografio, filatelio, ... al kiromantio, frenologio, al metafiziko kaj teologio. En tiu larĝa senco ankaŭ la lingvistiko estas la scienco fakanta apud la filologio kaj psikologio, aliflanke -- apud la fiziologio kaj akustiko. Tion neniu volas diskuti. La demando temas ĉu la metodoj de la nuna lingvistiko estas sufiĉe rigoraj kaj senpartiaj por ke ĝi povu nomiĝi la scienco, en la vera senco de la vorto, en kiu estas scienco la fiziko, astronomio kaj botaniko.

El historio de la civilizado ni scias ke la scienca metodo aperis, antaŭ 4 aŭ 5 mil jaroj, en la matematiko, nome en aritmetiko kaj geometrio, la du sciencoj kiuj naskiĝis el praktika bezono kalkuli kaj termezuri. La tria scienco estis astronomio intime ligita kun la religia kulto de astroj. Do, la unuaj fondintoj de la scienco estis saĝaj viroj el la komercistoj, terkulturistoj kaj pastroj. Por la apudmaraj nacioj ni devas aldoni ankaŭ la maristojn, kiuj bezonis sin orienti per la stelaro.

Post kvar aŭ kvinmiljara evoluo ĉe la hindoj, ĉinoj, iranoj, babilonanoj, egiptanoj, helenoj, araboj, kaj fine eŭropanoj, la matematiko kaj la astronomio nun prezentas plej altan tipon de la scienco. Poste, laŭ disvolvo de la kulturo, aperis mekaniko, fiziko, biologio, ktp. La lingvistiko, en la moderna senco, aperis apenaŭ cent jaroj antaŭ nuno, en komenco de la XIX-a, fondita de Bopp, Pott, Grimm, k. a. Neniu pensus diskuti pri la sciencaj kvalitoj de la lingvistiko, plej juna inter la branĉoj de homa scio, se ne la lingvistoj mem, kiuj atribuis al sia fako ecojn, kiujn ĝi ne povas havi, nome -- precizecon kaj certecon. En plej lasta tempo la novo-filologia skolo eĉ afirmas ke la fonetikaj leĝoj estas absolutaj, t. e. senesceptaj. Samtempe, la doktoroj de lingvistiko ne toleras opiniojn k. studojn de personoj ne apartenantaj al la oficiala rondo de lingvistaro, kie la aŭtoritatoj havas grandegan rolon. En ĉiu alia fako, se oni prezentas novajn

faktojn aŭ novajn teoriojn, oni estas aŭskultata kaj atentata, eĉ se la aŭtoroj iom deflankiĝas de la tradicia esprimformo. Male estas en lingvistiko, kie oni simple rifuzas legi aŭ atenti ion ajn publikitan de ne diplomitaj filologoj. En historio de astronomio tre gravaj eltrovoj k. servoj estis faritaj de amatoroj Baily, Hevelius, Huygens, Fabricius, John Herschel, Olbers, Encke, Biela, Ross, Lassell, kaj nuntempe pli ol tricent amatoroj helpas al profesiaj astronomoj en ilia studo de ĉielo. Sed alie estas en lingvistiko, kie neniu amatora studo, plej serioza k. utila, estas eĉ legata. Tamen, en praktiko, ni vidas kuraciston Littré kiu verkas grandan vortaron de franca lingvo, kuraciston Dahl kiu faras same por la rusa.

Komplikita mekanismo da leĝoj, reguloj, signoj, elpensitaj literoj, radikoj, bazoj, temoj, afiksoj ktp. en moderna lingvistiko havas aspekton de scienca sistemo, preciza kaj absolute certa. Tamen, rigardante de proksime oni tuj konstatas, ke tiu kolosa piramido bazas sur la sablo. Efektive, ĝis kiam ni ne havas fidindajn vortarojn de ĉefaj lingvoj, ni ne povas diri ion definitivan, en lingva materio. El 135 lingvoj k. dialektoj de indeŭropa familio, apenaŭ 15 estas iom funde esploritaj. La granda rusa popolo ankoraŭ ne havas finitan vortaron de sia lingvo, k. ni esperas ke ĝi estas finita ĉirkaŭ la 1950. Hindaj lingvoj estas tero nekonata por eŭropanoj, kiuj kontentiĝas je pecetoj da sanskrito. Eĉ la klasika latino ne estas studita ĝisfunde, kaj pli ol duono de ĝia vortaro restas enigmo je vidpunkto de etimologio. Do ni travivas periodon de materialkunigado, kaj tiu periodo daŭros ankoraŭ dum jarcentoj. Sed kun nunaj metodoj en lingvistiko oni iras al ĉiam pli kaj pli granda haoso, ĉar la nombro de esceptoj kreskas, dum la nombro de leĝoj estas malgranda, kaj tio mem pruvas ke la lingvistoj malpravas kiam ili pretendas sian fakon esti same preciza kaj certe bazita, kia ja estas astronomio aŭ fiziko. Lingvistiko atendas sian Lavoisier, kiu ĝin faros „lingva hemio“ dum ĝi restas ankoraŭ „lingva alhemio“.

Petro Stojan.

## „LINGVAJ RESPONDOJ“ DE DRO ZAMENHOF.

Klarigo por novaj legantoj.

La unua verko pri esperanto (Dro Esperanto: Mejdunarodnij jazik. Varsovio 1887.) enhavis krom longa antaŭparolo gramatikon el 16 reguloj, vortareton el neplena milo da radikoj kaj specimenojn de ses mallongaj, kelkliniaj tekstoj de prozo kaj poezio. Tio estis modesta bazo sur kiu devis konstrui kaj konstruis la unuaj esperantistoj. Grandega, mirinda disciplino de esperantistoj konservis tiun ĉi bazon sensanĝa ĝis hodiaŭ kaj sur ĝi konstruis grandegan konstruaĵon de la nuna esperanto same riĉa kiel elasta, konservante malgraŭ tio ĝiajn simplecon, facilecon kaj unuecon.

La unuaj laborantoj kaj la postaj komencantoj devante esprimi per simpla kaj facila esperanto ĉion, kio estas esprimebla per malsimplaj kaj malfacilaj lingvoj naciaj, sentis certajn embarasojn kaj iajn dubojn kompreneblajn ĉe la lingvo, kies tradicio estis nur kreota. En tiuj embarasoj ili turnis al la kreinto de esperanto demandojn, ĉu tio aŭ alia estas ĝusta, kio el tio kaj tio ĉi estas pli bona, ĉu tio ĉi ne estus pli bona ol tio ktp. Fine venis ankaŭ kritikantoj demandantaj pri la motivo aŭ deveno de kelkaj detaloj de la lingvo, eventuale ili faris siajn kontraŭdirojn. Ĉiujn ĉi demandojn kaj kaj kritikojn dro Zamenhof respondis publike, prese, kaj tiel naskiĝis vico da liaj lingvaj klarigoj esprimantaj liajn opiniojn pri diversaj lingvaj problemoj kaj sukcesplene forigantaj ĉiujn dubojn kaj kontraŭopiniojn. Tiuj ĉi lingvaj klarigoj de dro Zamenhof estas interesa kaj instrua aldono al lia ĉefverko „Fundamento de esperanto“ (1905) kaj grava kaj utila helpilo por konatiĝi al si la lingvajn opiniojn kaj principojn de dro Zamenhof, pri kiuj „Fundamento“, tiu ĉi oficiala lingva kodo de esperanto, direkte ne parolas.

Aperis tri serioj da lingvaj klarigoj de dro Zamenhof: 1. la unua serio en la gazeto „La Esperantisto“ (redaktata de dro Zamenhof) dum la jaroj 1889—1893; 2. la dua serio en la gazeto „La Revuo“ (redaktata de prof. C. Bourlet kaj eldonata de la firmo Hachette et Cie) dum la jaroj 1906—1908; 3. la tria serio en la „Oficiala gazeto esperantista“ (eldonata de „Centra oficejo esperantista“ en Parizo) en la jaroj 1911—1912. Al tiuj ĉi klarigoj verkitaj kaj publikigitaj de dro Zamenhof mem aliĝis klarigoj notitaj kaj publikigitaj (en „Lingvo internacia“, „Universo“, „Travivaĵoj de Ro. So“ k. a.) de la personoj, al kiuj dro Zamenhof, ĉu skribe (Max Butin, Richard Sharpe), ĉu buŝe (Marie Hankel) respondis direkte kelkajn lingvajn demandojn.

Ĉiuj ĉi artikoloj estis kolektitaj kaj libre eldonitaj sisteme grupigitaj laŭ la internacia decimala klasifiko. Aperis tri tiaj kolektoj: 1. la unua kolekto titolita „Lingvaj respondoj aperintaj ĉe „La Revuo““ estis eldonita ĉe Hachette en 1910 kaj 1912 (48 respondoj); 2. la dua kolekto titolita „Lingvaj respondoj, nova serio“ estis eldonita de „E. centra oficejo“ en 1913 (29 artikoloj el „La esperantisto“ kaj 13 artikoloj el la „Oficiala gazeto esp.“); 3. la tria kolekto kun titolo „Lingvaj respondoj, plena kolekto“ estis eldonita de „E. centra

librejo" en 1925; tiu ĉi lasta estas represo de la du antaŭaj (90 artikoloj) kompletigitaj per kelkaj artikoloj (9) nove trovitaj. En tiuj ĉi libroj la respondoj de dro Zamenhof estas publikigitaj laŭvorte laŭ originaloj.

Krom la laŭvortaj esperantaj tekstoj aperis nacilingvaj ekstraktoj kun aldonitaj klarigoj (komentarioj). Aperis tri tiaj comentarioj: 1. la unua komentario, bedaŭrinde nefinita, estis ĉefa en „Skola esperanta“ (1920—23) titolita „Zamenhofŭv komentáf k mluvnici esperanta“ (Komentario de Zamenhof al la gramatiko de esperanto); 2. la unua komentario finita estis bonega germana verko de Walter Lippmann „Dr. Zamenhofs Sprachliche Gutachten in deutscher Bearbeitung“ (Lingvaj opinioj — bontrovoj — de dro Zamenhof en germana prilaboro); 3. la dua komentario finita estas ĉefa de H. K. Bouška aperanta en „La Progreso“ kiel memstara aldono sub la titolo „Jazykové výklady k mluvnici esperanta“ (Lingvaj klarigoj al la gramatiko de esperanto). Tiuj ĉi verkoj prezentas al la legantoj kernon de ĉiu artikolo de Zamenhof kun ĉiu ekzemploj.

Koni la lingvajn principojn de la kreinto de esperanto estas devo kaj neceso por ĉiu laboranto en esperanto, ĉu li volas aŭ ne volas blinde sekvi ilin. Ĉiuokaze estas tre utile koni ne sole „Fundamenton“, sed ankaŭ „Lingvajn respondojn“ por ĉiu, kiu volas helpi la lingvan unuecon, sen kiu la internacia lingvo estus neebbla. Al la ĝojiga fakto, ke inter la esperantistaro de la tuta mondo ekzistas absoluta lingva unueco, multe helpis ankaŭ la zorgo de esperantistoj koni kaj sekvi la principojn montritajn de Zamenhof en „Fundamento“ kaj „Lingvaj respondoj“. Studu ilin atente! —ou—

La komenca parto de „Lingvaj klarigoj“ (kun detalaj klarigoj) aperis en la pasintjara jarkolekto de „La Progreso“, la daŭrigo (kun la ĝeneralaj klarigoj kaj rimarkoj) aperas en la nunjara jarkolekto. La novaj abonantoj povas havigi al si komencan parton dumaniere; ili povas: 1. aŭ aĉeti la tutan pasintjaran jarkolekton de „La Progreso“ por malaltigita prezo (12 Kč anstataŭ 20 Kč); 2. aŭ aĉeti sole memstaran aldono (eltranĉitan) por ne-granda prezo (5 Kč). Tamen oni devas atenti, ke la nombro da disponeblaj ekzempleroj estas ne-granda, sekve estas rekomendinde fari la mendon kiel eble plej frue. Red.

V „Jazykových výkladech“ opravte si (inkoustem, ihned!): str. 33. ř. 17: příbor), ježto se tu rozumí; str. 34. ř. 21: (aby byl); str. 35. ř. 23: jaký?); od příslovce; str. 36. ř. 3. zdola: i uctivé; str. 40. ř. 14: ĉi-; str. 40. ř. 20: uniformitu); str. 40. ř. 21: přídavných); str. 42. ř. 24: vyslechna mínění; str. 43. ř. 4: defen-dinto de la patro; str. 42. ř. 2. dojde se k cíli.

## VITROPENTRADO

Al memlernantoj kaj al ĉiuj, kiuj havas intereson pri pentrado mi rekomendas skriban kurson: „Pentrado sur vitro“, enhavanta tri malgrandajn paĝojn en esperanto. Kurso kun pentrita glaso kiel specimeno kostas 20 Kč kaj sendas ĝin M. Görtlerová, Praha-Nusle, Otakarova 207.

## DEK DEMANDOJ.

II. serio, 11.—20.

Provu koncize respondi la jenajn 10 demandojn. Personoj, kiuj ĝis 31. Marto senerare respondos ĉiujn demandojn, estos publikigitaj kaj unu du el ili lote ricevos belan premion. Se neniu respondos (bone) ĉiujn respondojn, ni juĝos laŭ la maksimumo de la respondoj. La respondoj estu koncizaj, sed elĉerpu ĉion, kion oni scias pri la demando. Ili ne bezonas esti tiel detalaj, kiel estis niaj respondoj al la unuaj 10 demandoj en la 10 nr-o kaj ree estos la venontaj.

11. Nomu almenaŭ tri originalajn romanojn esp.!
12. Kiom da esp. kongresoj okazis en Svislando, kiam kaj kie?
13. Ĉu ekzistas en esperanto semajnaj gazetoj? Nomu!
14. El kiuj partoj konsistas la Fundamento de Esperanto?
15. Kiu estas la plej granda vortaro de esperanto?
16. Kiu estas D-ro Schulhof?
17. Divenu, kiom da membroj havas ĈAE en 1927?
18. Kiu estas la unua esp. klubo sur la teritorio de la nuna ĈSR.?
19. Kiujn senpagajn libropremiojn donas ĈAE al siaj membroj kaj por kiu kotizo?
20. Al kiu esp. poemo la ĉefa komponisto Suda komponis melodion?

## 23. TEXT K PŘEKLADU.

Budeme i v tomto ročníku uveřejňovati texty k překladu, střídavě těžší texty s lehčími. Překlady došlé do určité lhůty (tento do 15. března) prohlédneme, pořídíme podle nich poznámky jazykové a nejlepší překlad odměníme pěknou knihou, a i s poznámkami uveřejníme v nejbližším čísle. Řada našich čtenářů si text přeloží, avšak překlad nám nezašle; ze srovnání vlastního textu s textem přeloženým mají takoví čtenáři ovšem též prospěch, avšak pouze oni sami. Celé obci čtenářské však prospívá pouze ten, kdo nám svůj překlad zašle a tím nám umožní zjistit, které věci jsou našim čtenářům nejasné a dá nám tak možnost vysvětlit je v poznámkách.

Práce pod zemí je z nejkruťějších, které jsou člověku uloženy, a její traģika jest, že zůstává všem lidem skryta. Horník jest obklopen smrtí a dýchá smrt. V šachtě, dva kroky od něho ho nevidíte pro oblak uhelného prachu, v němž se krčí. Je-li práce lidský úděl, všichni, kdo jste neviděli, věřte, že toto je práce nelidská. Dědí se s pokolení na pokolení jako rodová kletba, a na žádném poli nebyla sociální politika (zkracujíc pracovní noc, které se říká pracovní den) takovou měrou věci lidského svědomí jako na tomto. Práce nejhornější a nejnezbytnější. Uhlí je začátek průmyslu, a plamen z jiskry uloupené nebesům by zde zhasl, kdyby ho neživila krmě ztělého podzemí. Nevidíme jich nikdy, ale oni zatápějí v našich krbch, oni se spalují v našich hutích, oni vlekou naše vlaky. Zápasí-li o své živobyti, zápasí také o naše.

Jar. Stránský.

## DIVERSA.

— Ofte ni legas en esp. gazetoj alvokon: Esperantistoj skribu salutleterojn al tiu kaj tiu neesp. kongreso. La propaganda efiko de tiaj leteroj estis tre granda ĉe la **Tutpola Poŝtista Kongreso** okazinta en Varsovio (IX. 1927), dum ĉeesto de pola poŝtministro. Kun granda intereso la delegitoj aŭskultis la polan tradukon de la leteroj de poŝtistoj irlandaj, estonaj, latvaj, vienaj, ĉeĥoslovakaj, svisaj, juĝoslavaj k. a. Kelkaj delegitoj akcentis la gravecon de Esperanto por la internacia poŝtistaro.

— Prof. D-ro Odo Bujwid, gvidanto de la pollanda esperanto-movado, plenigis sian sepdekan vivjaron. Medicinan fakultaton li studis kune kun D-ro Zamenhof. Li fondis la unuan polan instituton por inokulado de la kontraŭrabia serumo kaj estas fame konata en sciencaj rondoj eŭropaj.

— Heroldo de Esperanto publikigas **Leterojn el diversaj landoj. Leterojn el Ĉeĥoslovakio** skribas S-ro Bruno Gahler.

— En diskuto pri **krizo** de UEA kaj Heroldo, skribas S-ro V. Střihavka (Kladno) en Heroldo 48.: „La ĉefa kulpo de tiu ĉi malĝaja stato ŝarĝas unuavice la konsciencon de tiuj eldonantoj de diversaj „ankaŭ-internaciaj“ esp. revuoj aŭ gazetoj malpli valoraj, sed certe tute superflujaj por nia movado.“

— **Ĉeĥaj fervojistoj** diligente kunlaboras en la Fervojisto, oficiala organo de Internacia Asocio de la Esperantistaj Fervojistoj (IAEF), redaktata de Ilija F. Puhalo en Zagreb. En la 4. (novembra) n-ro po unu noto havas S-ro Jos. Řebíček (Olomouc) kaj J. Gunia (Přívov). — S-ro Kubásek (Plzeň) havas en 5. kaj 6. n-roj tradukon de artikolo Fervojoj en Hispanujo, verkita de Josef Hofmann, ĉefinsp. de fervoja ministerio en Praha. — S-ro J. Řebíček publikigas en la 5. n-ro tradukon de artikolo: Jubilea ekspozicio de la „Baltimore and Ohio Railroad Company“ en Baltimore dum Septembro 1927, verkita de D-ro Witte. — F-ino Sidonie Dlouhá (Praha) publikigas en la sama n-ro artikolon „Ni persistu“, por propagando inter fervojistoj. — Sola afero nur estas bedaŭrinda: ke IAEF ne povas trovi en ĈSR taŭgan personon, kiel sian reprezentanton (asesoron), kiu zorgus pri organizo de ĉs. fervojistoj esp. La ĝisnuna asessoro (ni ne volas nomi lin) ne transdonis la kolektitajn kotizojn al la centro kaj La Fervojisto publike avertas kontraŭ li.

**Preklady písní.** Zahraniční firma hodlá vydati esperantský zpěvník a výslovně si přeje míti v něm písně české. Jedná se o to: vybrati několik vhodných písní (národních), opatřiti jejich noty (opis). Překlad stačí prosou. Spolupráce jest firmou honorována. Kdo můžeš v této věci rychle jednat, dopiš laskavě redakci Progresu, která oznámí podrobnosti. Osoby námi přímo dožádané odmítly pro nedostatek času. Věc spěchá a jsme nuceni obrátiti se touto cestou na české esperantisty, kteří věci rozumějí. Bude jinak jejich vinou, že české písně budou scházeti; eventuální stížnosti na to po vydání zpěvníku a dokonce snad obviňování nakladatele ze zaujatosti národní s díky jako nesmyslné odmítneme.

**Tradukoj el la ĉeĥa literaturo.** Aug. Eug. Mužík: La meznokta (eble noktomeza? Red.) meso de grafo Bernardo, en Heroldo de Esperanto, nro 51. — Růžena Svobodová: Senindulga sorto, en Verda Stelo nro 12. Ambaŭ rakontoj tradukitaj de Perhak.

**Generala kunveno de CAE** estas projektata por dimanĉo la 25. Marto 1928. Loko kaj programo estos publikigita en la venonta nro.

**IV. Ĉeĥoslovaka kongreso esperantista** okazos en Teplice-Sanov dum pentekosto (26—28. Majo). Defalaj sekvos.

## DE LA REDAKCIO

Ni esperas, ke niaj abonantoj kun plezuro akceptos tiun ĉi enhavoriĉan numeron de la nova jarkolekto. La mankantaj rubrikaj aperoj en la venonta n-ro. Ni enkondukas novan rubrikon, kiu enhavas en la nuna nro du ĉeĥajn artikolojn sur la 12. paĝo, kaj por kiu ampleksan materialon sendis al ni S-ro dir. Rud. Frídriĥ en Brno. La rubriko, dezirata de niaj propagandistoj, enhavas batalan materialon por esperanto, atentigos pri kontraŭdiroj malamikaj, donante samtempe argumentojn por ilin refuti. — Ĉeĥaj informoj **Z esperanského světa** daŭre enhavas koncizajn informojn pri la movado por ke niaj kunlaborantoj en la Gazetara servo havu materialon por sialokaj gazetoj neesperantistaj. — Informoj **El Ĉeĥoslovakio** donos materialon por amikoj de ĈSR en eksterlando, kaj ankaŭ por niaj samideanoj korespondantaj kun la eksterlandaj. — Rubriko **Diversa** enhavas revuon de ĉio interesa, kio aperas en aliaj gazetoj esperantistaj, propagandaj aŭ fakaj. — Pri la aldono **Jazykové výklady** vidu specialan atikolon de -ou- sur la 9. paĝo. — Krom la ĝisnuna enhavo la **Lingva Fako** dediĉos specialan atenton al lingvaj eraroj de ĉeĥoslovakoj, konstatitaj en kunvenoj, korespondo, kaj en publikajoj, celante esti ankaŭ tiamaniere utila al la rondo de niaj legantoj. —

**Bultenon** de CAE kun informoj pri la ĉs. movado enhavas la venonta n-ro. — **Vigla kunlaboro** por ĉiuj ĉi rubrikaj estas tre bonvena. Precipe bonaj tradukoj de bonaj ĉeĥaj literaturajoj ne abundas ĉe ni.

La dua kaj tria nro aperos ankoraŭ en marto. Koncerne la aperon de la pluaj nroj ni esperas agrable surprizi niajn abonantojn. Ili bonvolu pardoni la nuna malfruigojn, kaŭzitan de tuta serio de akcidentoj, private-profesiaj kaj esperanto-movadaj. Pri la lastaj ni provizore ne volas paroli.

Ni dankas al niaj amikoj, kiuj subtenis nin ĝis nun — per kunlaboro, abonado, varbado, kritikado k. a. — kaj petas ilin ankoraŭ pli energie daŭrigi en tiu agado.

La Progreso estas entrepreno de ĉiuj ĉs. esperantistoj, servis, servas kaj servos al ĉiuj. Persona havaĵo de la eldonanto kaj kelkaj aliaj samideanoj ĝi estas en tiu nebonŝanca senco, ke ili portas sur si la riskon de la eldonado kaj ĝarantias por eventualaj ŝuldoj. — Malgrandigu ilian riskon, varbante en kluboj, kursoj, kunvenoj pliajn abonantojn!

Redakcio.

## PRIPENSU KAI UZU!

## OBTIŽE DOROZUMIVACÍ.

Procházel jsem se po německém městě, neznaje slova německého. Znal jsem však přece dvě nebo tři z oněch velkých a posvátných slov, která udržují pohromadě naši evropskou civilizaci. — Jedno z nich je „cigáro“. Usedl jsem ke stolku v zahradní restauraci a poručil si doutník a džbáněk piva. Vypil jsem pivo a zaplatil za ně. Vykouřil jsem doutník, zapomněl za něj zaplatit a odešel jsem. Asi po deseti minutách jsem si náhle vzpomněl, že jsem doutník nezaplatil. Vrátil jsem se do té restaurace a položil peníz na pult. Ale hostinský také už zapomněl na doutník a vyrážíje tázavým tónem jakési hrdelné zvuky ptal se mne, tuším, čeho si přeji. Vyslovil jsem mezinárodní slovo „cigáro“. Hned mi podal doutník. Odsunul jsem doutník s odmítavým posunkem a ukázal na peníz na pultě. Domníval se, že mé odmítnutí je odsouzením onoho doutníku a přinesl mi jiný. Zašermoval jsem rukama jako větrný mlýn snaže se strhující universálností svého posunku dáti na jevo, že mé odmítnutí se vztahuje na doutníky vůbec. On však přikvapil, maje ruce plny nejrozmanitějších doutníků a počal mi je nabízet. V zoufalství jsem se pokusil o jiné druhý posunku, ale čím více jsem odmítal, tím vzácnější a dražší doutníky vynášel on ze skryší svého podniku. Marně jsem se snažil vymyslet způsob, jímž bych mu dal na jevo, že jsem doutník už měl. Napodobil jsem kouřícího člověka, jak oklepává popel a odhazuje doutník. Pozorný a úslužný hostinský myslil, že si jen v duchu představuji slasti doutníku, který si přeji. Posléze jsem se s nepořízenou vzdálil. Hostinský však nechtěl si ponechat peníz a jda za mnou, strkal mi je do kapsy. — Doufám, že andělé o soudném dni vysvětlí onomu nešťastnému muži pravdu šetrným způsobem. — Pojem dluhu je takového rázu, že ho nelze vyjádřit vůbec fyzickými prostředky, poněvadž je pojem abstraktní. A celá civilizace sestává z abstrakcí. — (Chesterton, Ohromné maličkosti, český překlad, str. 108.) (R. F.)

## ODBORNÍCI NEVYNALÉZAJÍ PRAKTICKÝCH VĚCÍ VE SVĚM OBORU.

Není zvláštní zjev, že umělá řeč esperanto byla vytvořena lékařem, neboť skutečně praktické věci nebývají vynalezeny uznanými praktiky. Pozorujme na př. dnešní poštovní známku. Každý by se jistě domníval, že ji vynalezl poštovní praktik. Nikoli. Začátkem minulého století bylo ještě velmi obtížné podati dopis. Kdo jej chtěl odeslati, musil jíti napřed na poštu, kde se dopisy podávaly, a po dlouhém listování v různých knihách a po všelijakých okolcích byl dopis přijat. Že je jednotné porto, jak jsme tomu nyní zvyklí, tomu je sotva něco přes šedesát let. Dnešní poštovní známka, která to umožňuje, nebyla vynalezena poštovním praktikem, nýbrž člověkem, který neměl s poštovním mnoho společného, Angličanem Hillem. Když byla vynalezena, pravil v anglické sněmovně tehdejší ministr pošt: „Předně nemůžeme předpokládati, že by se tímto zjednodušením doprava tak ohromně zvětšila, jak si to představuje tento nepraktický Hill, a za druhé, kdyby se tak stalo, pak by pro dopravu nestačila londýnská poštovní budova.“ Tomuto velikému praktikovi ani zdaleka nenapadlo, že se poštovní budova musí řídit dopravou, a nikoli doprava poštovní budovou. A hle, věc vynalezená nepraktikem se přes odpor praktika uplatnila v dosti krátkém čase. — Podobně bylo se železnicí. Když se měla stavěti dráha, spojující Postupim a Berlín, řekl generální poštovní Spengler: „Vypravuji denně dva dostavníky do Postupimě, a ty nejsou obsazeny. Chtějí-li již lidé vyhazovati peníze oknem, nechť tak učiní přímo.“ — Reální život mívá právě takové praktiky, kteří se domnívají takto, že jsou praktičtí. (Podle Steinera R. F.)

\*

R. 1769 postavil Richard Arkwright, bývalý holič, první křídlový tkalcovský stroj a za dva roky po té první fádelnu, poháněnou vodní silou. — Přešla léta. — Z práce člověka, kterého zákony boží určily tkalcem, ač podle zákonů lidských cechů měl býti holičem, vyrostla obrovská města a obrovský průmysl Anglie. (F-R. en Tr.)